La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-09 n-ro 350

# Kiam la oceano ekbrilas



Kvin homoj mortigitaj en atako al TV-stacio en afgana ĉefurbo

Miopeco kreskas en la mondo

Premio Italio Homaj Rajtoj 2017 aljuĝita al Itala Esperanto-Federacio

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Kvin homoj mortigitaj en atako al TV-stacio en afgana ĉefurbo
*En Kabulo p. 03*

Turkio: alarmaj mesaĝoj estis trovitaj en vestaĵoj de la varmarko *Zara*
*La dungitoj deziris averti la klientojn pri siaj laborkondiĉoj p. 03*

UN urĝas Kurdan regionon en Irako respekti konstitucion
*Helpa Misio de la Unuiĝintaj Nacioj en Irako p. 04*

Sekureca Konsilio laŭdas kontribuon de policaj eroj al packonservo de UN
*Packonservado kaj specialaj politikaj misioj p. 04*

Miopeco kreskas en la mondo
*Stranga epidemio p. 05*

Aŭstralio: Aljuĝo de la Nobel-premio pri paco al ICAN estas granda surprizo
*Pro ĝia laboro altiri atenton al la katastrofaj prihumanecaj konsekvencoj de ajna uzo de nukleaj armiloj p. 06*

Kiam la oceano ekbrilas
*Foje oni vidas eĉ pli da beleco se oni malŝaltas la lumon p. 07*

Antaŭ 60 jaroj Laika forvojaĝis en spacon
*Kvarpieda pioniro p. 09*

Hodiaŭe
*Imre KERTÉSZ; Muhammad IKBAL; kaj Egretardeo p. 10*

Premio Italio Homaj Rajtoj 2017 aljuĝita al Itala Esperanto-Federacio
*Premio "tutmonda civilizo kaj homaj rajtoj" p. 11*

Magio de vorto aŭdata
*AULD, William. La infana raso: 2 diskoj kaj libro p. 12*

Nova servo por ILEI-membroj
*Kunlaboro inter ILEI kaj edukado.net p. 13*

# Kvin homoj mortigitaj en atako al TV-stacio en afgana ĉefurbo

Lokaj aŭtoritatoj diris, ke almenaŭ kvin homoj estis mortigitaj kaj 21 aliaj vunditaj marde [07 nov 2017] en terorista atako kontraŭ loka televida stacio en Kabulo, la ĉefurbo de Afganio.



Sekureca oficialulo diris al la novaĵagentejo *Xinhua* [新华社 xīnhuáshè], ke du teroristoj atakis la televidon *Shamshad*, privatan puŝtulingvan kanalon, en la kvartalo *Chaman-e-Huzuri*.

La anonima oficisto diris, ke la mortintoj inkluzivis sekurecan gardiston, laboristinon de la televidstacio kaj du atakantojn.

La atakantoj, vestitaj en polica uniformo, rifuĝis en konstruaĵon ene de la instalaĵo kaj interŝanĝis fajron kun speciala trupo, kiu atingis la okazejon tuj post la atako.

La ekstremisma grupo Islama Ŝtato deklaris sian respondecon pri la atako.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Turkio: alarmaj mesaĝoj estis trovitaj en vestaĵoj de la varmarko *Zara*

Komence de novembro, klientoj de magazenoj de la varmarko *Zara* en Istanbulo, trovis sur la etikedoj, krom informoj pri lavado, kaŝitajn alarmajn mesaĝojn de teksaĵlaboristoj. Tiuj ĉi laboras en manufakturo de la grupo *Inditex* (al kiu apartenas *Zara*) en Turkio. En apenaŭ du linioj, la dungitoj deziris averti la klientojn pri siaj laborkondiĉoj: «Mi fabrikis tiun artiklon, kiun vi aĉetas, sed mi ne ankoraŭ estis pagita».




Laŭ la informoj de Associated Press, la etikedoj ankaŭ indikis, ke la dungitoj laboras por subtraktanto de la grupo, la entrepreno Bravo. Sed ĉi tiu societo subite fermiĝis, kaj ŝuldas tri monatojn da salajroj al siaj laboristoj, kaj ankaŭ monkompenson pro maldungo. La grupo *Inditex*, ĝis nun ne deziris komenti la aferon.

Tio ne estas la unua skandalo frontita de la fama hispana varmarko. En 2016, enketo de la BBC aparte malkaŝis, ke siriaj rifuĝintoj – el kiuj neplenaĝuloj – estis ekspluatataj en teksaĵlaborejoj de subtraktantoj de gravaj varmarkoj kiel *Zara*.

Neniam Milito Inter Ni

# UN urĝas Kurdan regionon en Irako respekti konstitucion

La Helpa Misio de la Unuiĝintaj Nacioj en Irako marde [07 nov 2017] urĝis la Kurdan Aŭtonoman Regionon de Irako respekti la verdikton de la plej supera kortumo de la iraka federacio pri nacia unueco.




La plej supera kortumo de la iraka federacio lunde publikigis verdikton, dirantan, ke Irako neniel permesas nacian secesion, tial iu ajn provinco aŭ regiono ne devas sin apartigi el Irako.

La Helpa Misio de la UN en Irako marde [07 nov 2017] publikigis deklaron, urĝantan la kurdan regionon aprobi kaj subteni la verdikton de la plej supera kortumo kaj reaserti respekton al la iraka konstitucio. La deklaro emfazis, ke estas urĝe bezonata politka intertraktado inter la centra registaro de Irako kaj la instanco de la kurda regiono.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Sekureca Konsilio laŭdas kontribuon de policaj eroj al packonservo de UN

La Sekureca Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj lunde [06 nov 2017] adoptis rezolucion, emfazantan la gravan kontribuon, kiun la policado de la UN povas fari al packonservado kaj specialaj politikaj misioj dum la konflikta ciklo.



En la unuanime adoptita rezolucio, la 15-membra Sekureca Konsilio substrekis la gravecon de politikaj solvoj al konfliktoj kaj decidis inkluzivi surbaze de kazo post kazo la policadon kiel integran parton de la mandatoj kaj decidfaraj strukturoj de packonservaj agadoj kaj specialaj politikaj misioj de la UN.

La Konsilio apogis la rolon de la policado de la UN en la klopodoj de la UN por malebligo de konfliktoj kaj alvokis la ĝeneralan sekretarion de la UN certigi, ke planado de packonservado kaj specialaj politikaj misioj de la UN kun policaj mandatoj estas bazita sur kompleta analizo de la situacio, kapabloj kaj bezonoj de gastiganto-ŝtatoj

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Miopeco kreskas en la mondo

Stranga epidemio okazas en la mondo, pri kiu oni ne tre atentas. Alarme kreskas la kvanto da miopaj homoj, precipe en orientaj landoj. En sudorienta regiono de Azio, preskaŭ 90 procentoj el la studantoj estas miopaj, kiam ili finas sian studadon. Inter la jaroj 1920 kaj 1980 la kvanto da kazoj duobliĝis. Kaj same pri preskaŭ duono el la eŭropanoj en la aĝoj inter 25 kaj 29 jaroj. Tio signifas milionojn da personoj.



**La demando estas: kial?**

Miopeco estas okuldifekto kun forta genetika kaŭzo, sed tio ne klarigas ĝian fortan kreskadon dum la lastaj cent jaroj. Miopuloj ne sukcesas bone vidi malproksimajn objektojn; ĉi tiuj aperas al ili kun malprecizaj konturoj, kiel se eksterfokusaj. Unu tuja ekspliko estas la tro ofta kaj intensa uzado de okuloj por legado kaj komputilumado. Fakte, oni trovis drastan diferencon inter homoj, kiuj finis universitatan studon, kompare kun tiuj, kiuj ĉesigis studadon je la 16-jara aĝo – la kvanto estas duobla en la unua grupo. Tamen, nur komputilumado ne klarigas la kialon de tiu epidemio, ĉar granda pliiĝo de kazoj okazis en la komenco de la 20-a jarcento, antaŭ la invento de komputiloj.

Unu neatendita faktoro aperis en la datumoj de esploristoj. Okazado de miopeco atingas multe pli ofte homojn, kiuj malofte vivas en libera aero. Alivorte, kiuj ĝuas po kelkajn horojn en ĉiu tago en kampoj kaj parkoj (kun vastaj horizontoj), tiuj suferas malpli ofte de miopeco, ol tiuj, kiuj vivas konstante enfermitaj en ĉambroj. Oni ankoraŭ ne scias la kaŭzon de tia rilato. Ĉu temas pri bonfaro de la hela lumo de suno? Ĉu la homaj okuloj nature bezonas rigardadon al foraj objektoj (iam utilan por ĉasado, ekzemple)? Ĉu la kaŭzo estas manko de vitamino D, kiun transdonas la suna lumo? Mankas ankoraŭ precizaj klarigoj, sed provizore estas rekomendinde, ke ni kaj niaj infanoj pasigu almenaŭ kelkajn horojn sub libera ĉielo, ĉiutage.

Miopeco postulas okulvitrojn, kontaktolensojn aŭ kirurgion. Ĝi pliigas la riskon de retinaj difektoj laŭ la pasado de la tempo. Pro pli granda nombro da miopuloj, en la nuna tempo, eble pliiĝos la kazoj de blindeco en la mondo, estontece. Tio signifas, ke oni devas laŭeble preventi. Probable ĝi estas unu plia alvoko al la homaro, ke oni zorgu pli bone pri la naturmedio kaj ĝuu pli ofte kontaktadon kun ĝi.

Paŭlo Sergio VIANA
Esperanta Retradio

# Aŭstralio: Aljuĝo de la Nobel-premio pri paco al ICAN estas granda surprizo

Aljuĝo de la Nobel-premio pri paco al ICAN, la Internacia Kampanjo por Aboli Nukleajn Armilojn [*the International Campaign to Abolish Nuclear Weapons*], surprizis multajn, inkluzive de aŭstralianoj, kiuj ne konsciis pri la laboro de ICAN aŭ ĝia modesta komenco en Melburno en 2007. Kritikistoj ankaŭ rimarkis, ke Aŭstralio mem ankoraŭ ne subskribis la Traktaton pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj, kiun antaŭenpuŝis ICAN.

La Norvega Nobel-komitato elektis ICAN "pro ĝia laboro altiri atenton al la katastrofaj prihumanecaj konsekvencoj de ajna uzo de nukleaj armiloj kaj pro ĝiaj pioniraj klopodoj por efektivigi laŭtraktatan malpermeson de tiaj armiloj." La premiiĝo de ICAN ĝenerale ricevis pozitivan reagon en sociaj komunikiloj.

ICAN kampanjis senlace por traktato, precipe ĉe la Nefermita Laborgrupo de UN en Ĝenevo post ĝia fondiĝo en 2015. Sed kelkaj rigardis la premiiĝon de ICAN kiel nur simbolan. Kvankam 122 ŝtatoj voĉdonis por la traktato, neniu el la nuklearmitaj ŝtatoj estis inter ili. La aŭstralia registaro ne subskribos la traktaton malgraŭ la premo fari tion. Aŭstraliaj delegitoj ĉe la intertraktado de malarmado estis akuzitaj, ke ili estas "ruzuloj."




Medact, iu brita ICAN-partnero, rememorigas al la mondo, ke ICAN havas longan vojon ĝis ĝi atingos sian celon malpermesi ĉiujn nukleajn armilojn. ICAN samopinias. Kvankam ĝi estis fondita en Melburno, ĝi translokis sian tutmondan sidejon al Ĝenevo, Svislando, en 2011 por alproksimiĝi al la loko, kie UN kunordigas siajn intertraktadojn pri malarmado.

Adaptite el
Kevin Rennie
Tradukita de Arase Sayuki
Global Voices

# Kiam la oceano ekbrilas

Foje oni vidas eĉ pli da beleco se oni malŝaltas la lumon.

Esenca por ĉiu romantika filmo estas unua kiso. La ĉefkarakteroj promenas ekstere dum bela nokto kaj kisas unu la alian sub la lumetoj de centoj da lampiredoj. Aspektas kvazaŭ la etaj insektoj briligis siajn lumetojn nur por la amparo, sed la vera romantiko nur videblas kiam oni rigardas de proksime. La lumoj venas de la virlampiredoj, kiuj havas tre specifan ritmon de moviĝoj kaj ekbriloj. Ili rekoneblas, ĉar la danco malsamas por ĉiuj specioj. La inoj sidas sur la branĉoj de proksimaj plantoj kaj reagas per sendi flava-verdan lumsignalon reen kelkajn sekundojn poste. Ŝi elektas la vireton kun la plej hela lumo kaj taŭga ritmosenco. Tiel ŝi povas esti certa pri tio ke sia partnero estas sana kaj havas multan energion. La vireto alproksimiĝas kaj denove dancas, post kio li estas invitita por reprodukti. Kion la virlampiredo bedaŭrinde ne rimarkis, estis ke li flugis al la malĝusta lumo la tutan tempon. Je la fino de sia vojo li trovis la buŝon de lampiredo el la genro photuris, kiu lerte imitas la lumon de aliaj specioj por logi viretojn kaj manĝi ilin. La amparo ne pensu pri tio nun, sed tia ja estas la mondo de biolumineskо.



Ne nur insektoj povas ekbrili. En multaj lokoj oni povas trovi brilantajn fungojn. Ekzistas okdek specioj kaj ĉiuj vivas de ligno. La fungoj produktas verdan lumon kun ondolongoj inter 520 kaj 530nm, kio igas ilian aspekton eĉ pli misterioza ol tiu de kutimaj fungoj. Oni ne certas pri kial fungoj elspezus energion kreante lumon, sed sciencistoj havas ideojn pri tio. Povas esti ke la lumo logas bestojn en la malhelo, kiuj povus helpi la fungojn disvastigi sporojn. Ankaŭ eblas ke la ĥemia reago kiu produktas la lumon helpas la fungon forigi la nedeziritajn produktojn de la digestado de ligno. Kio ja iĝis klara estas ke la meĥanismo kiu kreas la lumon sufiĉe similas al tiu kiun lampiredoj uzas.

Estas klare ke lampiredoj estas majstroj de brilado, sed kiel ili kapablas fari tion? La sekreto estas tre ruza ĥemia reago. En la malantaŭo de la besto troviĝas molekuloj, kiuj nomiĝas ”luciferino”. Tiu ĥemiaĵo povas reagi kun oksigeno kaj ATP, molekulo kiu estas uzata por konservi energion en ĉeloj. La reago iras tre malrapide, krom se oni aldonas la enzimon ”luciferazo”. Luciferino kaj luciferazo ne estas specifaj molekuloj, sed kategorioj de molekuloj. Lampiridoj uzas specifajn molekulojn el tiuj kategorioj, sed aliaj organismoj uzas aliajn kombinojn. La rezulto de tio estas malsamaj koloroj de lumo. Pro tio ke la ĥemia reago produktas lumon tiom efike, preskaŭ 100% de la energio transformas al lumo. Tio estas multege pli ol ampolo, kiu transformas 5% de la energio al lumo kaj la reston al varmo. Pro tio, oni nomas la lumon produktita de biolumineskо ”malvarma lumo”.

La kontinenta vivo havas kelkajn belegajn

ekzemplojn de bioluminesko, sed ili nur estas ekceptoj. Pro tio ke bestoj povas vivi je ĉiuj profundecoj kaj pro iliaj gigantecoj, oceanoj enhavas pli ol 90% el la lokoj taŭgaj por vivo. Ili ankaŭ enhavis loĝantojn dum preskaŭ la tuta historio de la tero, kio signifas ke marbestoj havis multe pli da tempo por eksperimenti. Pro tio ankaŭ la plejparto de biolumineskaj organismoj troveblas en la maro. Oni ne bezonas plonĝi profunde por rimarki tion. Jam duona jarcento antaŭ la naskiĝo de Kristo, la Greka ŝipisto kaj filozofo Anaksimeno miris ke kiam li remis, la remiloj fojfoje ekbrilis bluverde kiam ili puŝis la akvon. Post dumil jaroj, esploroj kun mikroskopo montris kiu kulpis. La spektaklo estis kaŭzata de *Noctiluca scintillans*, *Noctiluca miliaris* kaj *Pyrocystis noctiluca*, algoj kiuj profitas de bioluminesko.

La strategio malantaŭ la bioluminesko de ĉi tiuj organismoj estas interesa. Ŝajnas kontraŭintuitiva ke organismo kiu tro etas por fuĝi ne kaŝas sin pli bone. Kompreneble ne estas tiom simple. La algoj elsendas lumon kiam ajn ili estas ĝenataj, ĉar tio povas signifi ke predanto estas proksima. Pli grandaj predantoj kiel fiŝoj kiuj vidas la lumon estas avertataj kaj alproksimiĝas. Tiam ili povas forĉasi aŭ kapti la malamikojn kaj savi la mikroorganismojn. Kiam la akvo enhavas ege multe da nutraĵojn, oni povas detekti la lumon per satelitoj. Tiuj datumoj estas uzataj por studi la direkton de marfluoj kaj nutraĵoj. La kromefiko estas tre bela vido.

Aliflanke bioluminesko estas kiel glacimonto. La plejparto troveblas sub la surfaco. La supraj 200m de la oceanoj estas la luma zono. Tie fotosintezo eblas, sed pli profunde ol 40m tio jam iĝas malfacila. Tamen la tuta luma zono estas konsiderata la oksigena fabriko de la oceanoj. Inter 250 kaj 1000m profunde, lumo ankoraŭ detekteblas, sed la kvanto draste malaltiĝis. Sub tiu travolo estas la senluma zono, kie vivas bestoj kiuj neniam vidis la sunon. La nura sparko kiu restas estas la lumo produktita de bestoj. Profundaj amasoj de akvo havas la kvaliton ke lumo interagas kun la akvomolekuloj kaj ŝanĝas sian direkton, aŭ absorbiĝas. Tio okazas unue kun la plej longaj ondolongoj. Pli profunde ol dek metroj, ruĝa lumo estas filtrita kaj ju pli profunde oni iras, des pli da kolora riĉeco la mondo perdas. Plej profunde eĉ verda lumo malaperas kaj restas nur blua lumo kiu malrapide iĝas malpli intensa ĝis ankaŭ ĝi malaperas. Se bestoj volas ke ilia lumo estu kiel eble plej efika, ili do produktu bluan lumon, por ke ĝi estu videbla de kiel eble plej longa distanco. Blua lumo eĉ funkcias tiom multe pli bone, ke 90% el la biologie produktata lumo estas blua.

Estas klare ke blua lumo plej bonas por esti vidata, sed kial oni volus tion? Ŝajnus multe pli logike se bestoj uzus la malhelon al sia avantaĝo por kaŝi sin. Se neniu brilus tamen, neniu vidus ion ajn. Oni ne povus trovi partnerojn aŭ manĝon kaj finfine ĉiuj mortus. Estas do plej bone por ĉiuj se ĉiuj bestoj brilas. Unu el la plej bonaj ekzemplej de fiŝo el la profundo estas la Ceratiidae. Ĉi tiuj fiŝoj troveblas en la senluma zono kaj aspektas inferaj. La plej granda parto de la ineto estas kapo kun granda buŝo kaj dentoj. La stomako povas streĉiĝi por enhavi bestojn kiuj pli grandas ol la fiŝo mem. El la dorso kreskas longa ŝnuro, kies pinto enhavas biolumineskajn bakteriojn. La fiŝo movas la lumeton kaj esperas ke aliaj bestoj kredas ke ĝi estas pli eta fiŝo. Ili alproksimiĝas por manĝi ĝin, post kio la fiŝo mordas. Tiel la fiŝo ne bezonas elspezi valoregan energion por ĉasado. La viretoj aspektas tute malsame. Ili ne kapablas manĝi kaj kiam ili eliras el la ovo, ili tuj ekserĉas inon. Renkontiĝoj inter la fiŝoj estas tre maloftaj, do ili ne povas esti kritikemaj. Kiam la virfiŝeto, kiu estas nur kelkaj centimetroj granda, vidas la multe pli grandan fiŝinon, li mordas ŝin. La vireto produktas enzimojn kiuj kunfandigas la du korpojn. Tiel la vireto iĝas parasito kiu vivas de la fiŝino. Ne estas malavantaĝo por la fiŝino tamen, kiu povas atendi ĝis ŝi pretas por

produkti ovon. Tiel certe ĉeestos vireto por reprodukti.

Oni ankaŭ povas brili sen esti vidata. Ekzistas fiŝoj en la familio de *Stomiidae* kiuj havas tiun kapablon. Pro tio ke granda plejmulto de la biologie produktata lumo estas blua, la plejparto de bestoj kiuj loĝas tiom profunde nur kapablas vidi bluajn kolorojn. Kelkaj fiŝoj en tiu ĉi familio produktas du kolorojn de lumo tamen. La ŝnuro sub la mentono funkcias simile al tiu de la *Ceratiidae*, sed malantaŭ la okuloj, ili havas aldonan fonton de lumo. En eta organo ili havas bakteriojn kiuj produktas bluan lumon, sed la vojo eksteren estas blokita de filtrilo. Tiu filtrilo absorbas la energion de la blua lumo kaj elsendas ruĝan lumon. Tio ebligas sekretan komunikadon kun samspecianoj kaj helpas kiam la fiŝo serĉas manĝon. La ruĝa lumo videbligas la predon, sed ĝi ne scias ke ĝi estas vidata. Kiam ĝi detektis la predon, la fiŝo povas surprizataki. La predo neniam scios kiu mordis.

Biolumínesko estas unu el la plej mirindaj kapabloj kiujn organismoj povas havi. Lampiredoj estas nur unu ekzemplo el abundeco da brilantaj organismoj. Kio videblas estas ke vivo povas adapti sin al la plej strangaj medioj kaj ekhavi la plej strangajn formojn, se naturo petas tion de ili. La fenomeno ne estas nur bela por spektanto. Kiam oni faras genetikajn eksperimentojn, oni aldonas genojn por biolumínesko al la ŝanĝita DNA. Tiel oni povas vidi ekzakte kiuj ĉeloj estas modifitaj. La moralo estas ke ni povas ankoraŭ lerni multe de la naturo kaj ke la naturo povas helpi nin. Indas protekti ĝin kaj miri pri ĝi kaj eble la naturo igos niajn vivojn iomete pli luma.

Frank van Hertrooij
scivolemo.wordpress.com

# Antaŭ 60 jaroj Laika forvojaĝis en spacon

Je la 3-a de novembro 1957 unuafoje iu viva estaĵo lasis la terglobon trafante la kosmon: la hundineto Laika [Лайка Lajka] (nedifinita raso) forflugis per la rusa homfarita satelito “Sputnik 2”.




Kadre de la kosmaj aventuroj, tiu kvarpieda pioniro iĝis la unua viktimo, kaj de tiam same okazis al aliaj bestoj kaj homoj laŭlonge de la tempo.

Inter la jaroj 1948-a kaj 1961-a, 48 hundoj, 15 simioj kaj du kunikloj malfermis la vojon al la kosmaj malkovraĵoj, sed 27 el ili mortis pro akcidentoj aŭ neatenditaj cirkonstancoj dum la entreprenadoj.

Laika estis la ununura besto intence sendita al nepra morto for de nia planedo, ĉar en tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis sufiĉe da teĥnikoscienco por reveni al la Tero. Grupoj pri bestoprotektado protestis, post sciigo pri la morto de Laika en la spaco.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



## Imre KERTÉSZ

**KERTÉSZ Imre [KERtes IMre] (naskiĝinta la 9-an de novembro 1929, mortinta la 31-an de marto 2016 en Budapeŝto) estis hungara verkisto. En 2002 li fariĝis la unua verkisto el Hungario kiu gajnis la Premion Nobel de Literaturo**

**En Esperanto aperis: *Sensorteco*.**

**Vikipedio**

---

## Muhammad IKBAL



**Muhammad IKBAL (urdue: محمد اقبال) naskiĝis la 9-an de novembro 1877 en *Sialkot*; mortis la 21-an de aprilo 1938 en Lahoro) estis la plej grava 20-jarcenta islama poeto de Pakistano. Li verkis en la urdua lingvo kaj la persa lingvo.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Granda egretardeo.**

**Vikipedio**

# Premio Italio Homaj Rajtoj 2017 aljuĝita al Itala Esperanto-Federacio

La asocio “Internacia Libera Gazetaro - FLIP” kaj la Itala Sekcio de Amnestio Internacia ĉiujare aljuĝas la premion italan por homaj rajtoj nomatan “tutmonda civilizo kaj homaj rajtoj” kaj dediĉitan al la memoro de la eksa vicprezidanto de FLIP, Antonio Russo, donis la premion (diplomon kaj pentraĵon) de 2017 al la Itala Esperanto-Federacio. Ĝi motivigis sian decidon per la jena deklaro:

La Itala Esperanto-Federacio estis fondita en 1910. Ĝi estas oficiale agnoskita senprofitcela asocio de 1956.

Ĝi partoprenas regule en la kampanjoj organizitaj de la monda asocio de esperantistoj por helpi esperantistojn, kiuj estas viktimoj de naturaj katastrofoj kaj de militoj en la diversaj regionoj de la mondo.

Ĝi kontribuas al la kampanjo de Unesko “Serio Oriento-Okcidento” por diskonigi la literaturajn ĉefverkojn de la diversaj kulturoj eksterlanden; el la itala estis tradukitaj al Esperanto verkoj kiaj *Dia Komedio* de Dante, *La Princo* de Machiavelli, *La Malemuloj* de Verga, *La Gefianĉoj* de Manzoni, *Homa vivo* de Ungaretti, la *Kantoj* de Leopardi, *Myricae* de Pascoli, kaj ankoraŭ aliaj.

Oni proponas al la itala publiko ankaŭ kelkajn ĉefverkojn de la Esperanto-mondo, kiaj *Modernaj Robinzonoj* kaj *Maskerado* de Tivadar Soros, *La Infana raso* de William Auld, *La Zamenhof-strato* de Roman Dobrzynski kaj ankoraŭ aliaj.

Inter la statutaj celoj de IEF oni legas: “ …inspire de la idealoj de Esperanto, [IEF] aranĝas solidarecajn iniciatojn, kiuj celas antaŭenigi pli profundan kulturan integriĝon inter homoj kaj popoloj kun malsamaj lingvoj".

Temas pri principoj kaj celoj komunaj al la premio “Homaj Rajtoj 2017” de la asocio FLIP kaj la itala sekcio de Amnestio Internacia, kiuj volas agnoski ĝian valoron kaj aparte mencias la prezidantinon de IEF, Michela Lipari.

En lastatempa ceremonio en Romo la premion akceptis, nome de Itala Esperanto-Federacio, ĝia menciita prezidantino, Michela Lipari.

Informilo de Esperanto por UN, n-ro 31

# Magio de vorto aŭdata

AULD, William. *La infana raso: 2 diskoj kaj libro*. — La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2007.

La parolata kaj, sekve, aŭdata, vorto ĉiam havas sian ĉarmon. La unuaj provoj de niaj Esperanto-pioniroj uzi la lingvon parole (do, aŭde) tuj post la turno de la 20a jarcento rezultis en entuziasmega decido organizi Universalajn Kongresojn. Kiam ni lernas alian lingvon, nin ĉiam helpas laŭta artikulado de novaj sonoj, iliaj kombinoj, vortoj kaj pli longaj tekstoj.




Mi memoras tiun miraklon, kiam mi ekparolis Esperanton post kelkaj jaroj de la Esperanto-soleco — vortoj muldiĝis mirakle kaj sonis fabelmuzike en miaj oreloj. Per sono, la lingvo kaj ties kulturo, animo, spirito — penetras en nin kaj vivigas. Ni, homoj, nur relative ne antaŭlonge lernis legi "mallaŭte, al ni mem" — ankoraŭ en la Antikva tempo oni devis laŭtlegi por kompreni la tekston.

Antaŭ pli ol 25 jaroj en Esperanto-tendara biblioteko en miajn manojn finfine trafis la avide atendita grandioza filozofia poemo, "originale verkita en Esperanto", *La Infana Raso* de William AULD. Kaj mi penis trovi minutojn liberajn de organizaj zorgoj — legis kaj legis, penetrante la signifojn kaj brilecon de la famega verko, laŭtega himno al la Homo, sobra kaj senfine ama kaj esperiga. Neeviteble mi legis laŭte, ĉar alie ne eblis kaj ne indis, kaj mi volus aŭdi kaj penis imagi kiel ĝin legus la aŭtoro. Mi volis paroli kun li — do aŭdi lian voĉon.

Post multaj jaroj mi aŭdis la voĉon de Auld en sporadaj intervjuoj de Radio Polonia, sed ĉefe lia voĉo, pli imagata, sonis kiam mi legis liajn verkojn.

Kaj jen donaco — la Kooperativo de Literatura Foiro publikigis la poemon en la propra recito de la aŭtoro mem! Jam post lia forpaso — li restas en ĉi sonoj de sia voĉo, plu vivigante niajn Lingvon kaj Kulturon. Du lumdiskoj (KDoj) en firma koverto kun fotaĵo de la aŭtoro kaj la "reprezentantoj de la eldonejo" (Perla kaj Valerio), broŝuro kun la teksto grafike prezentita kiel en la unua eldono, kun la originaj desegnaĵoj kaj unu el la plej konataj fotaĵoj de AULD. La pro-la-disk-formata kvadrata broŝuro enhavas, krom la poemteksto kun ĉiuj prezentaj specifaĵoj aŭtoraj, kompletajn notojn reviziitajn de la aŭtoro. Ĉio estas senriproĉe bonkvalita, kiel ĉio, kion mi iam vidis el LF-koop.

La voĉon de William AULD oni registris en Skotlando en 1998, kaj finproduktis en … Meksiko. La poemo, dividita en 25 kantojn, estas legata kun fona muziko varia. La aŭtora plenumo, mi ĝoje konstatis kaj konfesas, estas superega. La Aulda voĉo sonas elokvente, simple, trankvile sed samtempe forte kaj penetre. Mi ŝatus aŭdi opinion de tiu, kiu povus aŭdi tion konscie kaj Esperanto-scie unuafoje en sia vivo. La ioma eĥeco aldonita ornamcele plimisterigas kaj profundigas la impreson. Kaj la voĉo restas centre de via atento, ĝi tenas vin ne lasante, kapte. Verkite kiam li estis 32-jara, voĉlegita multe pli poste, la verko restas preskaŭ ekstertempa — Auld kvazaŭ parolas kun si mem, krom ni.

Iam la presita teksto iuvorte ne tute koincidas kun la dirata — tio nur aldonas al la viveco. Neatendite vi pli profunde komprenas, kian trezoron vi aŭdas/legas/havas — ke en "farita lingvo" kun vi elanime rekte kaj potence parolas pensulo kaj poeto, demandas kaj demandigas vin, pensigas kaj invitas serĉi kaj travivi kaj vivi, gvidante en ega tempa distanco kaj

ĉirkaŭkaptante la mondon, kia ni ĝin pensas esti. Oni povas ne kun ĉio konsenti, ne ĉion kompreni kaj des pli ne ĉion akcepti. Sed la teksto diras per si mem, se vi havas orelojn. Okazas magio de vorto legata kaj aŭdata. Aparte laŭdindas la muzika fona akompano — varia, superbe sonanta kaj brile trafa. Nu, ne ĉiujn pecojn mi povis identigi — verŝajne la koncernajn indikilojn indus enmeti, kompletige. Kaj post kiam vi fermas la libron kaj aŭdas la postsonan silenton, vi havas ŝancon aŭdi ion pli — la senvortan sed realan ekziston de viaj pensoj, demandoj, impresoj kaj streboj. Ie ni ĉiuj estas kune.

Andrej PEĈONKIN (Ruslando)
La Ondo de Esperanto. 2008. №5 (163)

---

# Nova servo por ILEI-membroj

Bonega kunlaboro regas inter nia instruista ligo kaj www.edukado.net kaj tiu kunlaboro plu kreskas. Grava aspekto de tiu kunlaboro : la registrado de ĉiuj kursoj en la mondo okazas ĉe edukado.net. Nek ILEI nek UEA volas eluzi limigitajn homfortojn por fari la saman kolekton ĉe sia flanko. Do la listo ĉe edukado.net estas la oficiala registrejo. La retejo www.edukado.net proponas tiun eblon elekti parton de tiu listo, vidigi kursojn laŭ niveloj ktp. La retejo de ILEI www.ilei.info ne proponas tian eblon.

Delonge validas la sekvo: se vi registras vian kurson ĉe edukado.net, vi ricevos liberan aliron al aro da ekzercoj, pli ol 800 eroj, do giganta kolekto de instrumaterialo. La dekstra bildo montras la mapan prezenton de kursoj. Sama aliro estas, se vi liveras ekzercojn, kiujn vi mem verkis.

Dua aspekto de la kunlaboro inter ILEI kaj edukado.net: ILEI-membroj ekde la unua de januaro 2018 havos liberan aliron al tiu instrumaterialo de edukado.net, tiun servon de la fama paĝaro.

La ILEI-membroj, kiuj deziras uzi tiun servon, devas anonci tion al sia sekciestro kun indikoj jenaj: Familia nomo; Individua nomo; Salutnomo ĉe edukado.net; Urbo, Lando.

Se en via regiono ne estas ILEI-sekcio, bonvole turnu vin rekte al Katalin Kovats kaj Mireille Grosjean. (katalin.kovats<ĉe>gmail.com; mirejo.mireille<ĉe>gmail.com). ILEI tre dankas al d-ino Katalin Kovats, kiu ebligas tiun liberan uzon. ILEI-memboj uzu tiun eblon kaj instruu Esperanton per tiuj iloj! Por membrigi vin en ILEI Iru al www.ilei.info. ILEI volonte akceptas iun ajn, kiu rekonas la gravecon de edukado kaj instruado; ne nepre necesas, ke vi estu profesia aŭ emerita instruisto. Same bonvenas kursgvidantoj kaj subtenantoj de la instrua programo de ILEI.

Estrara Komuniko EKO de UEA, 2017-30